Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 4 Decembro 2019



Ĉi-numere:


40 jaroj da *Survival*
Flagoj de Indianio
Aliaj Esperanto-flagoj
Ĉu flagoj aŭ mapoj?:
*Nauruo – Sankta Lucio -Kanarioj*
Simboloj de Andaluzio
Vortoj pri Flagoscienco
La Blazono de Mozambiko

# VENTO

## Veksilologia revuo en Esperanto

Eldonita de Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Adresoj: cordoba@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editado en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
*Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.*


**ENHAVO** Paĝo

| | |
|---|---|
| 40 jaroj da *Survival* | 3 |
| Flagoj de Indianio | 6 |
| Aliaj Esperanto-flagoj | 13 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 18 |
| Ĉu flagoj aŭ mapoj? | 20 |
| La Fotografaĵo de niaj Legantoj | 23 |
| Simboloj de Andaluzio | 24 |
| Vortoj pri Flagoscienco | 27 |
| La Angulo de la Blazonoj: *Mozambiko* | 29 |
| Mallongaj Informoj pri la Asocio V.E.N.T.O. | 31 |
| Flaga Humuro | 32 |

Sur la kovrilo: La Esperanto-Flago flirtas en Lahti (Finnlando) okaze de la Universala Kongreso de Esperanto de la jaro 2019.

# 40 Jaroj da *Survival*

Ĉi-jare estas la 40-a datreveno de la apero de la disko *Survival* (Supervivo) de Bob Marley & The Wailers, eldonita de la disko-kompanioj *Tuff Gongo* kaj *Island Records*. La kantaĵoj de la disko pritraktas temojn rilataj al la tut-afrika solidareco kaj per ĝi Bob Marley, la jamajka rastafaria kantisto, faras tutklaran alvokon por preni la armilojn cele la abolicon de la dominado kaj la tiraneco kontraŭ la afrikaj popoloj, kiuj tiutempe suferis pro la ekzisto de la apartisma reĝimo aŭ rasa segregacio en kelkaj afrikaj ŝtatoj. Tiel, Bob Marley kantis: *So arm in arms, with arms, we'll fight this little struggle. 'Cause that's the only way we can overcome our litte trouble".* (Tiel, brako apud brako, kun armiloj, ni luktos en ĉi tiu malgranda lukto. Jen la sola solvo pere de kiu ni povos superi nian malgrandan problemon).




Kovrilo de la disko *Survival* de la jaro 1979

La ĉefa kantaĵo sur la disko estas *Zimbabwe*, omaĝe al tiu afrika lando, kiu tiutempe ankoraŭ nomiĝis Rodezio kaj en ĝi regis la rasa segregacio kontraŭ la nigra popolo. Ĉi tiun kantaĵon mem, poste oni ludis okaze de la festoj dum la sendependiĝo de Zimbabvo en la jaro 1980 kaj nuntempe ĝi ankoraŭ estas konsiderata kiel ne-oficiala himno de la ŝtato.

El la veksilologia vid-punkto tio plej grava de la disko *Survival* estas la fakto, ke sur la kovrilo aperas 48 flagoj, 47 el ili de afrikaj ŝtatoj plus unu de Oceanio, konkrete de Papuo Nov-Gvineo. Ne ĉiuj afrikaj landoj aperas surkovrile, tiel, mankas la standardoj de Kaboverdo, Eritreo (kiu tiutempe ne estis sendependa ŝtato), Libio, Namibio (tiama sudafrika kolonio) kaj Sudafriko mem, kie ankaŭ regis la rasa segregacio.



Standardo de Papuo Nov-Gvineo, la sola ne-afrika flago
aperanta sur la kovrilo de la disko.

Rilate Zimbabvon, kiel dirite, sur la kovrilo ne aperas la nacia flago, komprenebla afero ĉar en tiu jaro (1979) la teritorio ricevis la nomon *Rodezio*, kaj ĝi ne estis agnoskata de la internacia komunumo pro la apartismo de la lokaj aŭtoritatuloj. Tamen, Zimbabvo ne estas forgesata sur la kovrilo, tiel estas videblaj la flagoj de la du plej gravaj politikaj partioj kiuj luktis kontraŭ la rasa segregacio, ili estis la partio ZANU (*Zimbabva Afrika Nacia Unuiĝo)* kaj ZAPU (*Zimbabva Afrika*



Flago de la politika partio ZANU



Flago de la politika partio ZAPU



Flago de Zimbabvo post la sendependiĝo en la jaro 1980


Do, estas tempo denove aŭskulti antikvajn kantaĵojn, festi pro la fakto, ke nuntempe la rasa segregacio ne ekzistas kiel politika sistemo en Afriko kaj ankaŭ vidi kiel la flagoj ŝanĝis, ĉar kelkaj el tiuj flagoj aperantaj sur la kovrilo de la disko jam ne ekzistas.

Notu la novan adreson de nia revuo:

cordoba@esperanto.ac

# Flagoj de Indianio

Trenton LUCAS




Indianio estas ŝtato en la mez-okcidenta Usono. Ĝi situas inter Ilinojso kaj Ohio, sude de la Grandaj Lagoj. La unua flago de Indianio estis ne-oficiala. Ĝi estis blua kampo kun la ŝtata sigelo en la centro kaj la nomo de la ŝtato.

La ŝtata sigelo estis simbolo de idealoj de la 19-a jarcento pri la limo. La setlanto tranĉanta la arbon malsupren reprezentis civilizacion forigante la limon. La bubalo estis ofta simbolo de la limo kaj ĝia kurado okcidenten celis simboli la randon de la limo moviĝanta okcidenten dum setlantoj eniĝis.

La jaro "1816" ankaŭ aperas skribita sur la siĝelo, ĉar en tiu jaro Indianio aliĝis al Usono kiel ĝia 19-a ŝtato.






La nunan Indianian flagon oni aprobis en la jaro 1917 fare de la Indiania ŝtatleĝaro. La flago havas bluan fonon kun ora torĉo kaj 19 oraj steloj. La torĉo kaj la radioj reprezentas la iluminadon. La steloj reprezentas la 19 ŝtatojn en la momento de la agnosko de Indianio kiel ŝtaton. La eksteraj 13 steloj reprezentas la originalajn 13 ŝtatojn, la 5 internaj reprezentas tiujn 5 novajn ŝtatojn post la fondintaj kaj la plej granda stelo super la torĉo reprezentas la ŝtaton Indianio, kies nomo aperas skribita super la torĉo.

La kolora skemo -oro sur blua fono- estas ofta en usonaj ŝtataj flagoj. Indianio estis frua adoptanto de ĉi tiu kolora sistemo. Tamen multaj flagoj, uzantaj ĉi tiun koloron, aperigas nur la ŝtatan sigelon sur blua fono. La flago de Indianio estas ankoraŭ tre malsimila al flagoj de aliaj ŝtatoj. La basketbala teamo de la ŝtato, la *Indiana Pacers*, adoptis ĉi tiun koloron, kiu plifortigas sian unuiĝon al la ŝtato en popola konscio.

Oni sugestas, ke la flago puvos esti plibonigita per la forigo de la nomo de la ŝtato. Ja, flagoj celas komuniki la identecon de la ento kiun ili reprezentas sen-vorte. Nenio perdiĝus, se la ŝtato forigus la nomon sur la flago kaj homoj ankoraŭ rekonus ĝin kiel apartenanta al Indianio.

Multaj urboj en Indianio kreis siajn proprajn flagojn. Mi ne pritraktas ĉiujn urbajn flagojn ĉi tie, sed jen almenaŭ parta rigardo al urbaj flagoj de la ŝtato.

**Indianopolo**




La flago de Indianopolo havas bluan fonon kaj blankan krucon. Sur la centro aperas ruĝa rondo enhavanta stelon. Indianopolo estas konata kiel la "Cirkla Urbo" *("Circle City"* en la angla), pro la urbocentro aranĝita laŭ rondo ĉirkaŭ la Monumento al Soldatoj kaj Maristoj. Indianio estas konata kiel la "Vojkruciĝo de Ameriko", kaj la kruco kaj rondo estas probabla referenco al tio, ironia fakto: la vojkruciĝo origine menciita per ĉi tiu alnomo estas la kruciĝo de usonaj ŝoseoj 40 kaj 41 -kiu fakte situas en *Terre Haute* sed ne en Indianopolo (alie *Terre Haute* ne havas urban flagon). La koloroj blanka, blua kaj ruĝa estas inspiritaj de usona flago. Do, jen bone desegnita flago, la ekvilibro estas tre alloga kaj la elementoj kuniĝas bone kaj ili havas signifojn.

**Fort Wayne**

*Fort Wayne,* fakte estis fortikaĵo dum granda parto de sia historio. Francoj konstruis komercan provizejon por komerci kun la *myaamia* vilaĝo *Kekionga.* Angloj prenis la fortikaĵon post la Sepjara Milito kaj ili donis novan nomon *Fort Miami,* derivita el la tribo

*Myaamia*, tamen ekzistas neniu rilate kun *Miami* en Florido. Usono kaptis la lokon post la Usona Revolucio, kaj renomis ĝin per *"Anthony Wayne -Freneza-"* laŭ li estis konata. La urbo kreskis ĉirkaŭ la fortikaĵo en la fruaj tagoj de Usono.





La flago de la urbo havas bluan fonon kun blanka cirklo en la centro kaj blankaj linioj por dividi la flagon laŭ tri partoj. Ĉiu parto enhavas ruĝajn simbolojn: la kapo de amerika indiĝeno, por reprezenti *Kekionga*; lili-floro por reprezenti la francojn kaj fine baŭmanta leono por reprezenti la anglojn. La ruĝa fortikaĵo en la centro kompreneble reprezentas la komencon de la urbo kiel fortikaĵo. La uzo de la kapo de amerika indiĝeno por reprezenti *Myaamia* de la popolo *Kekionga* povas ŝajni stranga, tamen ekzistas precedento pri ĉi tio en usonaj simboloj. Oni povus rigardi la flagon de la *American Indian Movement* kiel eble plej taŭga ekzemplo, kvankam kompare al la flago de *Fort Wayne* povas ŝajni kulturan taŭgecon, kiu estas temo lasita al aliaj eldonaĵoj. La flago denove prenas la kolorojn el la usona flago.

**Vincennes**

La urbeto *Vincennes* havas tre riĉan historion. Ĝi estis frua fortikaĵo apud la river *Wabash*, kaj ĝi estis grava komerca loko uzita

de francoj, angloj kaj usonanoj, simila al tiu de *Fort Wayne*. Kiam Indianio estis nur usona teritorio, *Vincennes* estis la ĉefurbo kie kunvenis la teritoria registaro. Kiam Indianio fariĝis ŝtato, oni translokigis la ĉefurbon, unue al urbeto *Corydon*, kaj poste al la nove konstruita Indianopolo, sed *Vincennes* restis kiel grava urbo. Hodiaŭ ĝi estas pli malgranda urbo, tamen kun granda historio.





La flago de *Vincennes* estas simila al tiu de Indianopolo pro la kolora skemo, la fono kaj la blanka kruco, kiu estas similaj en ambaŭ flagoj. Tamen la centra parto de la kruco ne estas ronda sed kvadrata. La ruĝa lili-floro reprezentas la francan fondiĝon de *Vincennes*.

Bedaŭrinde, sur la flago ankaŭ aperas skribaĵo, kio malsimiligas ambaŭ standardoj. La dezajno de la flago de *Vincennes* ŝajne estas pli malbela ol tiu de Indianopolo. Sur la flago aperas la nomo de la urbo, la jardo de la fondiĝo kaj granda litero V en la centro.

Rilata al *Vincennes* estas la flago de *George Rogers Clark*. La nomo de la standardo devenas de usona oficiro dum la Usona Revolucio, kiu flirtis la flagon ĉe *Fort Sackville*, post la konkero de la fortikaĵo al la britoj. Li mem ne desegnis ĝin, sed probable li ja uzis ĝin dum la batalo.

Oni ne scias, kial la flago uzas ruĝan kaj verdan kolorojn. Anekdotaj evidentaĵoj sugetas, ke la flago celis esti reale ruĝa kaj

blanka, tamen la sola ŝtofa materialo disponebla estis verda, kaj pro tio oni aldonis ruĝajn bendojn.




Oni diras ankaŭ, ke la dezajno celis referenci antaŭan pacan traktaton subskribita kun la lokaj indiĝenaj triboj, dum kiu oni interŝanĝis ruĝan kaj verdan vitro-bidojn. Tamen, tio kio estas tute certa, estas la fakto, ke kiam la milico de *Clark* prenis *Fort Sackville*, la estonta *Vincennes*, ĉi tiu flagon oni flirtigis por montri, ke la fortikaĵo nun estis usona.

**Lafayette**

Temas pri malgranda universitata urbo, fama pro la Universitato *Purdue*. La urba flago ne estas la plej belaspekte desegnita flago en ĉi tiu listo.

La fono celas esti blanka. La blua koloro celas reprezenti la riveron *Wabash*, dum la ruĝaj trianguloj emas elvoki la grekan literon *Delta* kaj simboli ekvilibron. La koloran skemon oni prenis el la koloroj de la flago de Usono kaj de Indianio. Mi ne ŝatas ĉi tiun flagon, ĉar mi ne loĝas en *Lafayette*, mi supozas, ke tio ne estas grava al mi, tamen ĉi tiu flago bezoras redesegnadon. La entuta dezajno estas alkroĉita kaj malorda. La ora stelo regas multe super la aliaj elementoj. La blua "rivero" estas tro stiligita laŭ mia opinio, kvankam mi komprenas, ke la rivero *Wabash* estas grava por la historio kaj kulturo de la urbo. La ruĝaj anguloj simple ne estas bone akceptitaj

kaj la signifo estas tro ĝenerala por posedi ajnan realan signifon rilate la urbon. Jen ekzemplo pri kiamaniere oni ne devas desegni urban flagon.





*Indianio, vojkruciĝo en Ameriko*


VENTO estas la sola revuo en esperanto kiu pritraktas flagosciencajn aferojn.
Kunlaboru kun ni !

# Aliaj Esperanto-flagoj

Ni ĉiuj konas la tradician esperanto-flagon, tiu kreita en Bulonjo-ĉe-maro (Francio) kelkaj monatoj antaŭ la okazigo de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1905. De tiu originala dezajno, tio estas verda tuko, havanta en la supra maldekstra angulo blankan kvadraton kun verda stelo, naskiĝis aliaj rilataj al Esperanto-movado mem, sed pli proksime al iu faka asocio aŭ movado ene de la Esperanto-familio. Ni vidu kelkajn el ili:

- **La SAT-flago**


Sennacieca Asocio-Tutmoda (SAT) fondiĝis en la jaro 1921, kiel la organizaĵo de la Laborista Esperanto-movado. Ĝi ekfunkciis en tempo kiam floris la bolŝevisma revolucio en Rusio kaj ĝi reprezentas la maldekstran laboristan branĉon de la Esperanto-movado. Ĝia ĉefa celo estas uzi la internacian lingvon Esperanto por atingi la celojn de la internacia proletaro. Do, la standardo de SAT tre similas al tiuj uzataj de la proletaj asocioj tra la tuta mondo.




Verŝajne, la unua bildo kie aperas verda stelo kaj ruĝa tuko estas ĉi tiu poŝtkarto, eldonita de la propra SAT dum la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento, tio estas, kelkaj jaroj post la fondiĝo de la asocio.

Tie oni asertas, ke per ruĝa savilo proletoj savas la dronantan verdan stelon.

Nuntempe, SAT uzas jenan flagon:



- **La GLAT-komunuma Esperanto-flago**

GLAT estas akronimo, kiu nomas la komunumon de gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj kaj transgenruloj. La GLAT-movado en Esperantio organiziĝis en la jaro 1977, tiam fondiĝis la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj. En tiu momento la ĉefaj simboloj de ĉi tiu internacia movado estis la greka litero *lambdo*, uzata de lesboj kaj rozkolora triangulo ĉefe uzata de gejoj. Ĉi tiu triangulo unuamomente estis insigno kreita de la nazioj por distingi al viraj samseksemuloj kaj aliaj *"kontraŭmoralecaj delituloj"*. En la 7-a jardeko de la pasinta jaro, ĝi estis revivigita kiel simbolo de protesto kontraŭ homofobio.



La Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj unuigis ambaŭ simbolojn al verda stelo kaj ĉi tiu estas la simbolo de la asocio.

Unu jaron post la fondiĝo de la geja branĉo de la Esperanto-movado oni ekuzis en Kalifornio (Usono) novan flagon okaze de la gejfieraj paradoj de San-Francisko en la jaro 1978. Unuamomente sur ĝi aperis 8 koloraj bendoj, reprezentantaj la diversecon de la samseksema komunumo. En 1979 el tiuj koloroj fine restis nur 6.

La esperantistaj GLAT-anoj unuigis ambaŭ flagojn, tio estas la GLAT-flago kaj tiu esperantista, kun la jena rezulto:



- **La Katolika Esperanto-flago.**

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) fondiĝis en la jaro 1910 en Parizo (Francio), kadre de la Unua Katolika Esperanto-Kongreso. Frue oni ekuzis kiel simbolon de la asocio verdan stelon kun blanka greka kruco ene de ĝi. Tiu blanka kruco fariĝis lastatempe du-kolora: flava kaj blanka, honore al la koloroj de la flago de Vatikano.




Verda stelo sur eldonaĵo de IKUE en la jaro 1939



Nuntempa verda stelo uzata de IKUE

La standardo uzata de ĉi tiu religia asocio estas tute simila al tiu de la Esperanto-movado, tamen ene de la verda stelo aperas tiu greka dukolora kruco.




- **La Jurista Esperanto-Flago.**

Kadre de la Ĝenerala Asembleo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio (IJEA), okazigita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Nitra (Slovakio) en la jaro 2016, oni aprobis la novan logotipon kaj standardon de la jura asocio de la Esperanto-komunumo.

La simbolo de IJEA estas verda stelo kun blanka pesilo kaj glavo aperanta ene de ĝi. Ĉi tiuj atributoj apartenas al la romia diino Justico, ekvivalento de la greka diino Temiso, kiu estas la alegoria personigo de la morala forto en juraj sistemoj.

Okaze de tiu renkontiĝo oni aprobis ankaŭ la uzon de la standardo de la asocio, kiu egalas al la Esperanto-flago, tamen la verda stelo aperanta sur ĝi estas egala al la logotipo de IJEA. La aŭtoro de ambaŭ simboloj estas la portugala esperantisto, ankaŭ prestiĝa veksilologisto, Antonio Martins-Tuválkin.



Logotipo kaj Standardo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio




Esperanto-flagoj flirtas okaze de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto
Lahti (Finnlando) julio - 2019

# Lastaj informoj pri Flagoj



## Malpermesita la uzo de la "*Olda Flago*" *en Sudafriko.*

La pasintan monaton aŭguston la Supera Tribunalo de *Gauteng*, en Sudafriko juĝis, ke la eksa oficiala flago de Sudafriko, tiu kiu flirtis dum la apartisma reĝimo en tiu lando, estas ligita al la ideo pri rasa segregacio kaj ĝi diskonigas malamajn sentojn.

Kvankam Sudafriko havas novan standardon ekde la jaro 1994, kelkaj sudafrikanoj montras tiun eksan simbolon ĉefe okaze de sportaj ludoj aŭ de renkontiĝoj publikaj aŭ privataj.



La juĝisto *Phineas Mojapelo* juĝis, ke "montri publike kaj senbaze tiun flagon diskonigas apogan mesaĝon al rasismo, al blankhaŭt-rasa hegemonio kaj al la submetiĝo de la nigra popolo". Laŭ la juĝo la signifo de la *olda flago* (tiel, ĝi estas konata la eksa sudafrika flago), povas esti komprenata kiel apogo al rasismo fare de la sudafrika socio. Do, ties uzo nur povas okazi por montri al novaj generacioj tion kio okazis dum la jaroj kiam regis la apartismo, sed tute ne por dividi la nunan socion.

# Nov-Zelando plendis pro la dezajno de la aŭstralia flago.


Flagoj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando estas tre similaj. En ambaŭ standardoj, sur blua fono, aperas la brita flago kaj stelaro reprezentanta la konstelacion Suda Kruco. Nur malsimilas la koloroj kaj formoj de la steloj, kune kun la aperigo de alia pli granda stelo sur la aŭstralia flago.

Antaŭ kelkaj monatoj la nov-zelanda ĉefministro, S-ro Winston Peters, petis al Aŭstralio ĉesi la kopiadon de la nov-zelanda flago kaj petis la kreon de nova dezajno por la aŭstralia standardo. Peters sciigis, ke "ili devus ŝanĝi sian flagon kaj agnoski la fakton, ke ni uzis unue tiun dezajnon".

La flago de Nov-Zelando estas uzata ekde la jaro 1902, tio estas, 50 jaroj antaŭ la oficiala agnosko de la nuna aŭstralia standardo.



Aŭstralio



Nov-Zelando

# Ĉu flagoj aŭ mapoj?

## *La flagoj de Nauruo, Sankta Lucio kaj Kanaria Insularo*

Se flago estas iamaniere la reprezentado de lando sur tolo, oni povas aserti, ke nenio pli taŭga ol aperigi la geografian realaĵon de tiu lando sur la flago mem. Ĉi tio povas okazi per du malsimilaj manieroj: unue, aperigi ekzakte la mapon de la teritorio sur la flago, kiel tiuj standardoj de Cipro aŭ de Kosovo.



Cipro



Kosovo

Alie, oni povas uzi formojn kaj kolorojn, ne necese la mapon, por vidigi geografie tiun landon sur la flago. Ni vidu kiamaniere oni povas fari tion kaj konkrete rilate 3 flagojn: tiuj de Nauruo, Sankta Lucio kaj Kanaria Insularo.

Ne hazardas, ke tiuj tri teritorioj temas pri insuloj aŭ insularo. El la geografia vidpunkto, insulo estas la teritorio plej taŭga por aperigi ĝin ene de dezajno. Ni vidu nun tiujn insulojn kaj ties flagojn.

- **NAURUO**

Temas pri insula lando de Oceanio, situanta en Mikronezio, tuj apud la ekvatora linio kaj konsistanta en unu insulo. La lando havas 10.000 loĝantojn apartenantaj al 12 triboj. La ĉefa ekonomia de Nauruo estis la fosfata minejo, hodiaŭ elĉerpitaj.

Ni vidu nun la flagon kaj ankaŭ mapon de Nauruo.






Flago kaj satelita mapo de Nauruo. Ĉu ne similas ambaŭ?

Videblas, do, ke la blua koloro reprezentas la Oceanon Pacifckan. La flava centra linio rilatas al ekvatora linio kaj sub ĝi troviĝas la insulo Nauruo mem. La insulo aperas reprezentita per 12-pinkta stelo, pro la fakto, ke la insulo havas 12 ĉefajn tribojn. La stelo (insulo) havas blankan koloron pro la fosfato, la ĉefa mina rimedo de la insulo.

- **SANKTA LUCIO**

Sankta Lucio estas malgranda ŝtato ĉe la Karibia Maro. Reale temas pri unu sola insulo, ĝi troviĝas norde de Sankta Vincento kaj la Grenadinoj kaj sude de la insulo Martiniko.

Se paroli pri geografio, kiel dirite, Sankta Lucia troviĝas meze de la Karibia Maro, temas pri insulo kun belegaj sablaj plaĝoj kaj el ĉiuj punktoj de la insulo estas videbla la montoj Pitonoj, monda heredaĵo de UNESKO. Kaj kio pri la standardo?

Nu, meze de blua fono aperas triangulo tute simila al la formo de la plej granda monto Pitono. Ene de la triangulo aperas jenaj koloroj: flava, reprezentanta la belajn sablajn plaĝojn de la insulo; blanka kaj nigra, kiuj reprezentas la rasojn al kiuj apartenas la enloĝantaro de la insulo.









Flago kaj geografiaj vidindaĵoj de la insulo Sankta Lucio.

Ĉu la flago ne similas al mapo de la insulo?

- **KANARIA INSULARO**

Temas pri hispana regiono, kiu situas en la Oceano Atlantiko, proksimume je 100 kilometroj de la saharaj sablaj dezertoj en Afriko.

Se paroli pri la flago de la Kanaria Insularo, temas pri 3 vertikalaj bendoj kun koloroj blanka, blua kaj flava.




Mapo kaj flago de Kanaria Insularo



Laŭ eblas vidi sur la mapo, Kanaria insularo troviĝas okcidente de la sahara dezerto, meze de la Atlantika Oceano. Tio videblas sur mapo kaj ankaŭ sur la flago.

Kompreneble, ne temas pri la solaj flagoj en la mondo kiuj montras geografie la landojn reprezentataj, sendube kelkaj aliaj tiun rolon plenumas. Sed jen taŭgaj ekzemploj por komprenigi, pere de simbolo, la geografian realecon de teritorio.

## La fotografaĵo de niaj legantoj



En ĉiuj plaĝoj oni uzas la flagojn ruĝan, flavan aŭ verdan por montri ĉu estas permesite aŭ ne bani en la plaĝo. Lastatempe ankaŭ aperis alia standardo por sciigi pri la ĝena ekzisto de meduzoj en la plaĝo. Jen ĝi.

*Fotis José María Rodríguez Hernández. Monato aŭgusto 2019 en la plaĝo Valdelagrana de El Puerto de Santa María (Kadizo) Hispanio.*

# Simboloj de Andaluzio

Alejandro Burgos Escalante

Andaluzio estas aŭtonoma komunumo en la sudo de Hispano. El la politika vidpunkto ĝi estas konsiderata kiel historia nacio de la hispana ŝtato. La simboloj de Andaluzio estas rimarkindaj, ĉar ili havas influojn de jarcentoj pasintaj. Unue, ni analizu la flagon:



Flago de Andaluzio sen blazono



Flago kun blazono

La flago havas tri samlarĝajn striojn: du estas verdaj kaj la cetera estas blanka. Kial la flago havas tiajn kolorojn? Blas Infante, la patro de la andaluzisma politika movado, verkis, ke la ideo de la andaluzia flago kaj ties koloroj ŝuldiĝis al la flagoj portataj de virinoj dum manifestacio. Tamen, li klarigis, ke la elekto de la koloroj havas historiajn kialojn. Tiel, post la venko de la almohadoj en la batalo de *Alarcos*, sur la minareto de la ĉefa moskeo de Sevilo, flirtis verda flago (koloro de la islamo) kune kun alia blanka por festi tiun venkon.




Flago de la virinoj de la komunumo de *Casares*.

Nu, la blazono de Andaluzio estas ankaŭ tre speciala. Ĝi baziĝas sur tiu de la urbo Kadizo, en la sudo de Andaluzio.




Blazono de Kadizo




Blazono de Andaluzio

Sur la blazono de Andaluzio aperas jenaj skribaĵoj: sube, “Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro”; kaj supre, “Sinjoro Herkulo fondinto” (ĉi-lasta moto en la latina lingvo). Ene de ĝi aperas du leonoj kune kun Herkulo kaj du kolonoj. Kial aperas Herkulo sur la blazono? Jen la kialo: la heroo Herkulo (Heraklo por la grekoj) diiĝis kaj li tiel atingis la senmortecon. Tamen, antaŭ tio, li devis plenumi dekdu malagrablajn taskojn. Unu el ili estis ŝteli la gregon de Geriono, tri-kapa monstro, kiu regnis la ekstreman okcidentan regionon de la mondo. Tiu lando estas Andaluzio.

Ankaŭ estas uzataj aliaj flagoj kaj blazonoj, jen kelkaj el ili:



Simpligita blazono uzita de la Andaluzia Aŭtonoma Administracio.

Logotipo uzata de la Andaluzia Registaro



Flago uzata de la sendependendisma andaluzia movado. Ĝi estas konata kiel *Arbonaida*



Flago de la Junulara Sekcio de la Andaluzisma Partio



Naciisma flago kun tarŝiŝa stelo



Flago de la Andaluzisma Partio


# Vortoj pri Flagoscienco

✍ *Alejandro Burgos Escalante.*

En flago-scienco estas grave scii la signifon de la koloroj. Pro tio, jene mi klarigas la signifon de kvin koloroj uzataj en flagoj kaj blazonoj

## ORO

Ĉi tiu koloro estas, laŭ kelkaj spertuloj, la "plej nobla" el la heraldikaj koloroj.



Flago de Vatikano (1929 – nun)

## RUĜO

La koloro de la sango. Ĝi estas la plej sankta koloro de ĉiuj revoluciuloj, maldekstrulaj progresemaj fortoj kaj de la internacia laborista movado.



Flago de Sovetunio (1922-1991)

**NIGRO**

Ĝi estas de antikvaj tempoj la koloro de piratoj kaj de tristo. Pirato estas ankaŭ, laŭ la internaciaj kontraktoj, ĉiuj, kiuj misuzas fremdan flagon.




Pirata flago *Jolly Roger*

**VERDO**

Kiel simbolo de espero, ĝi estas la koloro de esperantistoj. Kun verda stelo en kvadrata kantono ĝi estas laŭ decido de la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en la jaro 1095, la flago de la internacia Esperanto-movado.

**BLANKO**

Ĉi tiu koloro montras la apelon por interpacigo de militantaj taĉmentoj.



Esperanto-flago. La verda koloro simbolas la esperon, tiu blanka la pacon kaj neŭtralecon kaj la kvinpinta stelo la kvin kontinentojn.

# La Angulo de la Blazonoj: MOZAMBIKO




La ĉefa elstaraĵo de la mozambika blazono estas la fakto, ke ĝi estas unu el la malmulegaj landaj emblemoj en la mondo, sur kiu aperas moderna armilo. Jes ja, sur aliaj blazonoj, kiel tiu de Gvatemalo, aperas antikvaj pafiloj, ĉar tiuj estis la armiloj uzitaj okaze de la sendependiĝo de tiu centramerika ŝtato en la jaro 1821. Laŭ tiu sama principio, tiuj ŝtatoj kiuj atingis sian liberecon antaŭ kelkaj jardekoj aŭ eĉ ĵuse, povus aperigi pli modernajn pafilojn, kiel tankojn, misilojn, ktp. Verdire tio tute ne oftas kaj eĉ povus ŝajni kiel malkongrua. Malgraŭ ĉi tio, sur la mozambika blazono aperas aŭtomata pafilo, temas pri la fusilo *Kalaŝnikov*, kreita en la jaro 1947 de la rusa armeo.

Ĉi tiun simbolon oni pritraktas sur la mozamibka konstitucio de la jaro 1990, ĝuste sur la artikolo 194-a. La blazono prezentas oranĝ-koloran fonon kiu finiĝas supre kiel dento-rado. Ene de la blazono aperas monto apud maro, super kiu lumas la suno. La monton kovras blanka malferma libro; super ĉi ĉio estas kruciĝantaj sarkilo kun tiu moderna pafilo. La komponaĵon kadras sukerkanaj tigoj maldekstren kaj maiza dekstren, envolvitaj ambaŭ per ruĝa rubando, kiu havas sube la nomon de la ŝtato en la portugala lingvo. Supre, inter la tigoj, situas ruĝa kvinpinta ruĝa kaj flava stelo.

Kio pri la signifo de ĉi tiuj elementoj aperantaj sur la blazono?

La tigoj signifas riĉecon; la dento-rado simbolas la laboristan klason kaj la industrion; la libro, klerigadon; la sarkilo, la kamparanan

klason kaj agrikulturon; la moderna pafilo simbolas la defendo de la patrujo. La ruĝa stelo signifas spiriton de internacia solidareco de homoj de Mozambiko kaj la ruĝa suno, la kreon de nova vivo por la mozambika popolo.




Ankaŭ sur la gvatemala blazono aperas pafilo,
kvankam ĝi datiĝas de la 19-a jarcento.

La apero de pafilo sur la blazono de Mozambiko ekigis debaton en la jaro 2005 inter la registaro kaj la ĉefa opozicia partio. Tiel, la partio RENAMO metis demandon pri ŝanĝo de la ŝtata simbolaro, cele la forigon de la fusilo el la nacia blazono. Laŭ la opozicia partio, la naciaj simboloj estis akceptitaj en alia historia momento, kiam oni luktis armile cele la sendependiĝon, tamen pro la nova realo tiuj simboloj devus malaperi.



Flago de Mozambiko

# Mallongaj Informoj pri la Asocio V.E.N.T.O.

Dank'al la Aŭstria Nacia Biblioteko, Esperanto-fako, ni sukcesis trovi la verkon *"Heraldiko kaj Veksilologio: Terminaro en Esperanto"*, kies aŭtoro estis la ĉeĥa Jaroslav KLEMENT, eldonita de Česke Budějovice, loka grupo de ĈEA, en la jaro 1973.

Kompreneble la verko bezonas aktualigon kaj plibonigon rilate desegnaĵojn, tamen ĝi povas utili kiel starto-punkto por eldoni estontece novan kompletan libron pri veksilologio, ĉefe vortaro. VENTO deziras meti je la dispono de kiu ajn interesito pri veksilologio tiun prestiĝan verkon, do se Vi deziras havi kopion de tiu verko ne hezitu peti ĝin al ni kaj ni havigos kopion de la libro rete al Vi. Nia adreso cordoba@esperanto.ac


Memoru, ke V.E.N.T.O. (Veksilologia EsperaNtista Tutmonda Organizo) deziras esti la faka asocio de Esperanto-Movado rilatanta al flagoscienco. Por atingi tion ,ni bezonas almenaŭ 25 interesitoj. Por aparteni al VENTO estas necesaj nek kotizo, nek kompromisoj.

Por aliĝi vi nur devas sendi mesaĝon tiu-sence al nia adreso.

Ni elstaras la TTT-paĝon de nia amikino Cristina BOLLINI, http://www.feniks.it/Flagoj.aspx

Tie, nia itala samideanino aperigas informojn pri la signifo de granda kvanto da naciaj flagon en lingvoj itala kaj esperanto. Do, se vi deziras pasi bonajn momentojn dum legado de veksilologiaj aferoj, ne hezitu viziti tiun ret-paĝon.

FLAGA HUMURO








*Elektu vian preferan torton por festi nian unuan jaron apud niaj legantoj.*

**VENTO**










VENTO
Via veksilologia informilo en
ESPERANTO